

# PENSEO

*N-ro 369*

*jul. / 2022*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 33-a jaro <http://www.elfino.cn/penseo/penlisto.htm>

## Tiberio Madonna (Italio)



### MIA NOKTO

Kaj kiam ĉi tiu nokto de l' mondo  
falos teren forkonsumita  
blindigita  
far la lumoj de la spiroj profundaj  
kaj de la manoj  
intertuŝiĝantaj sen timo  
mia nokto  
plu min brakumos  
kun la forto de polpego  
el la mallumo de l' abismoj profundaj.

Sen iu fino.

Alkroĉita al la muro de mia koro  
kun la kadro lazura  
la memoro de mia tago  
neniam plu revenonta.

### Larmo

Larmo da amo  
iĝas sango iĝas vino poste vinagro  
kaj poste vaporeliĝinta  
lasas sian tamenan signon  
ĉiamrestontan  
en la vivoglasoj el kristalo  
ĝis la tempo kiam  
la tempo  
estos ilin rompinta  
en milojn da eroj  
polvaj.

## Rita Mkrtchyan (Armenio)



Unua tago de somero,  
Unua vort', unua paŝ',  
De jar' al jaro ĉio ripetig'as,  
Sed ĉiu tag' por ni— novaĵ'.

Unua libro tre amata,  
Unuaj sentoj, amrigard',  
Vojaĝ' unua, renkontiĝo,  
Amika gaja rond' aŭ tendar'.

Fabel' unua kaj unua kanto,  
Poem' verkita, legis ĝin sen fin',  
Jes, estis nekuraĝa kaj senrima,  
Sed estis dediĉita al patrin'.

Unue, tamen, eble ĉiam  
La rev' — kiel boat' kun blanka vel',  
Rondiras tre rapide, nekutime  
De nia viv' "unua" karusel'!

\*\*\*



Via Moŝt' — socia reto!  
Ĉioebla, ĉiopova,  
Ni ricevas la respondojn  
Nur per unu simpla movo.

Ni "nudigas" la animon,  
Sed ne nian, la alian  
Kaj atendas la legantoj  
La novaĵojn tre variajn.

Ĵurnalistoj kaj verkistoj,  
La lingvistoj, profesoroj,  
Ni ripetas — ege sperta,  
Sed ne diras — bona homo.

Niaj karaj geamikoj,  
Se ni tuŝu politikon  
Iĝas tuj nekonatuloj,  
Inter ni aperas “muroj”.

Dialogo, povas esti  
Kontinuas kelkaj tagoj,  
Kaj en “kampo” politika  
Kolektiĝas “batalantoj”.

Ni ŝanĝiĝis eble ĉiuj,  
Estas klare la kialo,  
Translokiĝis ĉiuj homoj  
En la mondon virtualan.

Kiel la proverbo diras,  
(Ni ŝanĝigos iomete),  
En barel’ de gudro estas  
La kulero de mielo.

La mielo — estas vortoj  
Bonaj, varmaj kaj sinceraj,  
La naturo kaj muziko,  
La informo bonefika.

Bondeziroj karaj, belaj  
La amikoj bonaj, veraj,  
“Maro” — sen furiozaj ondoj  
En la sama “reta” mondo.

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



*Malhumaneco*

En ĉi tiu ombra junio,  
la perpleksa mondo ekspensas  
pri l’ abomena esprimo:

nome homaj restaĵoj,  
spuroj de barbaraĵoj  
kontraŭ du anĝeloj de l’arbaro...

Ankoraŭ eĥas en nia honto  
l’ekkrio de l’ poeto Castro Alves:  
Dio, ho Dio! Kie vi estas,  
kial vi ne respondas?

*Juiz de Fora, 18/06/2022.*

## Moissey Bronshteyn (Rusio)



Ĉu vi memoras la pluvon en tiu arda junio?  
Ĝi nin atakis inside, bruske en dens’ papava.  
Nia feliĉo malseka ĉielen levis nin super ĉio,  
kaj la humidaj petaloj ruĝis en mondo rava.

Ĉu vi memoras ke l’robo gluiĝis al via korpo,  
ke mi, ravita pro via svelto, la spiron retenis,  
ke ni proksimis, ke vian koron aŭdis do mia  
koro,  
kvazaŭ la varma pluvo milde nian proksimon  
benis?

Ĉu vi memoras pluverojn — jes, ilin forkisis  
mi de  
viaj malsekaj okuloj, vangoj kaj lipoj tenere?  
Mia aminjo kara, tiam ni vivis ja senmilite...

\*\*\*

Nun ĝuante trankvilon en paca ripoz’ de  
mia streĉa verkado, pli-malpli finita ĵus,  
mi jam scias pri kio mi min okupos poste,  
kaj sendube mi ankaŭ tiun laboron ĝuos.

Klaraj planoj kaj svagaj revoj bobelas ene  
de l’krania uj’ por la cerbo, foje pensema.  
Mi destinon mian admonas milde por ke ŝi  
bene  
tuŝu manon mian vespere por daŭra agado  
sema,

ke literoj-semoj pluve sur blankon ekranan

falu,  
 ho, ne en mania sed en pripensita ordo,  
 kaj intimajn sentojn per lerta alud' vualu,  
 kaj reagon veku en la komprenema kor', do

la poemoj pretaj facile flugos tra l'ret' etera  
 tentos vin lanuge, loge, ludante en stela lumo.  
 Mi normale ne celas per tio ja iĝi eterna, —  
 nur per vortoj voki vin al mia brakumo.

\*\*\*

Plu daŭras la milita maj'.  
 Inter suferoj kaj pereoj  
 l'naturu vivi volas, kaj  
 aktivi per aferoj kreaĵ.

Kaj mi, portempa ekzilit'  
 antaŭ floret' genuojn klinas,  
 ĉar finon havas la milit',  
 sed la naturo ja senfinas!

\*\*\*

Do jen denove Vologda.  
 Mi ne memoras, kiom da  
 vojaĝoj faris mi ĉi tien,  
 Sed sunori a tago nur  
 kaj paca ĉarmo de l' natur'  
 ekscitas mornan koron mian.  
 En maja for' de l' patroland',  
 kie ne pluas mia kant',  
 nun flamo senkompata regas,  
 kaj ĉe l' komparo emas sor  
 Leviĝi mia morna kor',  
 kaj doloregas.

## Ángel Arquillos (Hispanio)



# Transe

Transe de glacia monto  
 staras ĉarma ĝardeno,  
 tien, birdo fluge  
 transiras.



## Yohanes Manhиту (Indonezio)



# Malgraŭ la sezonoj forpasintaj

(Al ŝi, kiu daŭras esperi)

Sezonoj jam forpasas sed vi restas  
 kun multe da bonaj esperoj en la koro.  
 Malgraŭ la nescio, kiun mi skulptas,  
 vi konservas amon tagon post tago.

Mi ne scias kiom da tempo oni havas  
 por daŭri pretendi ke en la mondo  
 nur tro mallaŭta voĉo vi estas,  
 resonanta en oceano de bruoj.

La pordo de via koro malfermiĝas  
 kiam reĝas ankoraŭ mia nokto.  
 Tra la fenestro vi pacience vidas,  
 esperante ke tuj venu la sanlumo.

Longaj tagoj kaj noktoj forpasas  
 sed ĉio estas sama en ĝia esenco:  
 la espero en via koro ĉiam kreskas  
 kaj maturiĝas kun la tempopaso.

Florojn de amo mi vidas kaj konas  
 sed mi atendas kion diros la universo.  
 Mi ne estas majstro kiu arbitre diras  
 kiam jam venas la tempo de rikolto.

Sezonoj jam forpasas sed vi restas  
 kun multe da bonaj esperoj en la koro.  
 Mi admiras ĉion, kiun vi konservas.  
 Ni atendu kion diros la Majstro.

*Urbo Yogyakarta, 30/V/2009*

## Jam preskaŭ pluvos

Pluvbirdoj grupiĝas kaj flugas  
 trans la nuboj kaj ĉirkaŭ la lando  
 portante mesaĝon el pluvo vizitonta,  
 portante informon el nuboj mallumaj.

Formikoj laboras tage kaj nokte  
 por amasigi nutraĵon en tenejo.  
 Homoj nun konkuras fini laboron  
 provizi maizon kaj rizon sufiĉan.

Sekaj rizkampoj estas ĝojantaj,  
 riveroj kaj defluiloj soifantaj atendas,  
 lagetoj kaj lagoj senakvaj esperas  
 pluv-akvon falantan, graciportanton.

*Noemuti, Okcidenta Timoro, marte 2011*

## Papos Nascentes (Brazilo)



### Kompono

elektas mi songas akceptas  
 komponas  
 okazigas ĝin?

mia teksad' mateniĝas  
 riĉiĝas mia viv'  
 nobligas servi novon tekxi  
 okazigi ĝin?  
 ĉu iluzi'? ĉu ego'?  
 ĉu blinda flug'?

## Jadranka Miric (Serbio)



### Malbutonumado de la nova tago

Meze de la nokto malhela  
 dum la urbanoj dormas  
 flava luno laŭlonge de ĉielo vagas,  
 akompananta de sia norda stelo bela!

Ekis tago en malbutonumado .  
 Oriente sur la ĉielo dormanta  
 aperas aŭroraj veluroj violaj. La  
 dancorado,  
 super la naturo vekiĝanta.

Herbejo vekiĝas, sin per roso lavanta  
 al soifaj birdaro akvon donas,  
 kiuj dankas gaje pepante  
 fojfoje al ĉielo are fluganta!

Lazura ĉielo klare bluiĝas.  
 Suno malrapide leviĝas  
 dum sunlumo super arbar' briletas.  
 Milda venteto sur malfermita fenestro  
 frapetas.

## Klaŭno

Eniris la urbon Cirko.  
 Defilis ĉiuj grandbrue,  
 Surstrate saltetis klaŭno Mirko.  
 Feliĉiĝis li. Bedaŭrinde frue....

Amuziĝis Mirko, lia vizaĝo palis kiel  
 luno  
 dancante ĝis subiro de Suno.  
 Li ŝvitis, kaj gia ŝminko fariĝis makula  
 kvazaŭ li suferis de iu malsano okula.

Subita alveno de nekonata ino  
 lasis lin fripone senvorta .  
 Li vetis ke li estos morta  
 se Ŝi ne estu en lia sino!

Klaŭno ne sciis, ja karmo estas tia,  
 ke morgaŭo ne estos tempo lia.  
 Morgaŭ lin trovis morta iu s-ino pia  
 inter miloj da militpereintoj .

## Elena Popova (Bulgario)



### En la mondo de Picasso

(Tankaĵoj)

La pura amo –  
 infano kun kolombo.  
 Gutas larmetoj.

Du solaj infanetoj  
sur la verda kamparo.

Trista arleken'  
en medito. Sur tablo  
odoras kafo.  
Li sin demandas: "Ĉu la  
vivo estas nur ludo?"

Ĉu vera estas  
la am' de Jupitero?  
Trista estas la  
obeema Semela.  
Fortaj estas la dioj ...

Blanka figuro—  
Jesuo krucumita.  
Viro alnajlas.  
Iuj viroj lotumas...  
Senkoraj homoj kaj nun!

Blanka kolombo  
kun oliva branĉeto.  
Paco sur la ter'?!  
Nur senfinaj militoj.  
Paco – eterna revo...

Blankas la korpo  
de la akrobato. Ja  
Eleganteco.  
Ne videbla restas la  
laboro ĝis la venko.

Ploranta ino –  
Dora kun ruĝa ĉapel'.  
Senkonsoleco.  
Forflugas la amo, pli  
rapide ol Printempo.

Ventegaj sentoj –  
nuda virino dancas  
antaŭ partnero.  
Gitarist' en ekstazo.  
Ĉu danco pri plezuro?

Somera tago.  
virinoj ĉe l' fonto kun  
tristaj vizaĝoj.  
ili ankaŭ estas font'  
je amo kaj sindono.

Olga – belega,  
eleganta, sed trista.  
Pro libermanko?  
Memoro pri baletto?  
Ventumil' por konsolo...

### Ivanichka Magharova (Bulgario)



## Fasko da hajkoj

Stelo deŝiru  
el ĉielo kaj kaŝu  
ĝin en la koro!

Glasoj malplenaj  
trinkis mi amarvinon.  
Anĝeloj kantas.

Trompet' vastaĵon  
voĉplenigas. Birdoj  
en arbar' mutas.

Mildaj manplatoj –  
Ĉirkaŭprenado de infan'  
En stel' – okuloj.

Aŭtuna trompet'  
Sur la kampo malĝojas.  
Oriol' ĝemas.

Kvarmanegulo.  
Amiko de la homoj.  
Ĉiam fidela.

Korn' sonplenigas  
arbaron. Ravitecaj  
birdoj. Tagiĝas.

## Ruĝaj abrikotoj

Jen ruĝaj abrikotoj ĉie sub la ĉielo,  
Kolorigante montetojn je mirinda apero.  
La pluveto humidigas la floraron leĝere,  
Tiel plibeliĝas la printempo tre tenere.  
Ni spektu la ĉarman pejzaĝon kun espero  
Plene de antaŭvidebla novjara prospero!

## La eta blanka boato

En la lakta vojo de la blua ĉielo,  
Estas la eta blanka boato kun helo.  
Sur la boato staras la arbo osmanta,  
Ludumas la blanka kuniklo malgranda.

De la remiloj estas neniu apero,  
Sur la boato mankas veloj je vento;  
La blanka boato flosas al okcidento.  
Tra la lakta vojo de la ĉielo,  
Oni atingas al la buntnuba lando.

Kaj kie estas la plua celo  
Preter la buntnuba lando?  
En la fora okcidenta ĉielo,  
Orkolore lumas la matena stelo.

Al la lumturo similas,  
La stelo hele brilas.

## Frumatena sunlumo

Mi trotetas sur la vekita tero,  
Kun birdoj mi kantas el sincero.  
Dolĉan sonĝon levas kuira fumo,  
Kiel teneras frumatena sunlumo!

Herboj estas de rosoj ornamataj,  
Floroj estas brile delikataj.  
Nuboj ŝvebas tra la blua ĉielo,  
La sunon salutas fiŝoj el fidelo.

Mi ĝuas la freŝan matenan venteton,  
Kaj trovas de la vivo la sekreton.  
Se ni sekvas la paŝojn de espero,  
La mondo estos ĉie plene de belo!

*Elĉinigiŝ*



**Yi Qiao (ĉino en Germanio)**

**Mimoza Ahmeti**



## La forgesoj

Reala estas tio kio ŝajnas nereala  
La irado tra la aromoj en la rekrementoĵoj de la  
putreco  
Homa, kie la stinkoj stariĝas kiel orgasmoj  
En atmosferaj spasmoj kaj havas kolorojn je  
travideblecoj  
De la malpuraj, puraj kranioj  
Por la pulmoj batitaj en la vento, bonodoroj kaj  
degradecoĵoj.

La homoj lacigas min kaj trans ili  
Ekzistas tiom multe da mondoj kiuj  
Kvietigas kaj sensualigas la estaĵojn  
Por donaci ideajn elfiltrilojn  
Je sencela travivado.

Malfacile mi povas nei la perdon  
De la mia konscio kiel la solan  
Plezuron en la heliĝado  
De putriĝo kie neniam la alkoholo kaj cigaredo  
Estis, nur karuloj revataj  
Mankantaj  
Kiuĵn mia korpo tiel kiel la virinilon ne povis  
teni, tamen  
Tiom multe da perditecoj, dolĉeco je degradeco  
Kaj meze de tiuj, kiel floroj. Mirinda  
La imagpovo. La imagpovo.

Mia patro estas dirinta: neniam  
La viroj estos problemo por vi,

Kiu laŭ li: mi bone konsentis  
 Kun ĉiu viro je kiu ajn kaprico  
 Aŭ loko, kvazaŭ ĉi tiuj povruloj  
 Estus objektoj kaj ne estaĵoj kaj  
 Poste: la celon, ne forgesu la celon, ripetadis  
 mia patro,  
 Kvazaŭ ĉi tiu estis lanco, kiu devus  
 Eniĝi en la koron de la tempo.

Malŝarĝo. Imaga malŝarĝo. Kial do?  
 Ho patro, nenion vi diris pri la ruliĝadoj  
 En la mirindaj forgesoj, pri la steloj  
 Idealaj lumigantaj kiam ĵus la celo estingiĝas,  
 Pri la viraj impresoj, kiuj estus  
 Tiom raraj en mia vivo, kiel la trifolio kun kvar  
 folioj  
 En la fabeloj.

Kial vi ne diris: mia filino, eksaltu, ruliĝadu,  
 Ebriiĝu ĝis forgeseco kaj kaptu la realon per  
 spiritaj aŭroroj  
 Envolvante per kisaj burĝonetoj  
 Kiujn via benita karno kiel ĉiu junula karno  
 Povu konduki netuŝeblan tra la fluo  
 La rojiĝon,  
 Kaj krom ĉi tiu embrio, nenio alia ekzistas  
 Nur kotaĵo kaj socia plagiataĵo.

Kiom freŝa, lavita kaj malpeza  
 Iras la estaĵo tra la forgeseco, mi sentas la  
 harojn  
 En interrilato kun la aero kaj la okulojn en  
 interrilato kun la lumo, trans  
 Kiu fluas la rigardo.

Trans kiu, trans kiu  
 Trans la interrilato, trans la difino  
 Estas io tria kiu hazarde nomiĝas Dio  
 Sed ĝi estas nekaptebla, forirebla  
 Translokebla, donas ŝancon en la specifoj  
 Al la tuteco, kio signifas: ĉiu ligno- aŭ  
 ŝtonpeco  
 Povas vigliĝi kaj enkarniĝi kaj fariĝi stelo  
 Kaj tio estas la kialo de la ĉiuj ekzistaĵoj

De la kozoj kaj de tiom multe da kozoj  
 Tra ekzistaĵoj,  
 Kaj ŝajnas, kvazaŭ ĉi tie fulmas ia emo, simila  
 al la celo  
 Kaj ia magnetismo malpeza sensualigas mian  
 deziron  
 Por unu viro,  
 Tamen “por mi, tio neniam estis problemo”.

*Elalbanigis*



**Bardhyl Selimi**

(Albanio)

## El Ĉina Antikva Poezio

**Kang Yuzhi (?-?)**

—*laŭ melodio Longa sopiro*


Inter la montetoj suda, norda  
 etendiĝas lagpejzaĝo en nebulo.  
 La printempa belo min ĉagrenas  
 sen aper' de ŝia sveltfiguro.

Densas sent' de amo inter mi kaj ŝi.  
 Ŝi alvenis per kaleŝveturo,  
 rajdis mi sur fortĉevalo,  
 kaj ni rendezuis en pinaro kun susuro.

**Han Yuanji (1118-1183)**

—*laŭ melodio Proksimiĝas bona afero*

Ĉe l' lag' Smeralda,  
 je aŭd' de muziko korda,  
 mi sentas triston en la koro.  
 Malnovaj aktorinoj sur scenejo korta  
 jen kantas per la sama voĉ' antaŭa  
 jam kun grizharoj pro vipbato sorta.





Abrikotfloroj floras,  
anstataŭ en ĝardeno,  
prospere en sovaĝaj kampoj,  
kvazaŭ printempe kun ĉagreno.  
Nur fluo en kanal' palaca  
konas, ke ploras hom' en spleno.

## Zhu Shuzhen (?-?)

—laŭ melodio *Mallongigita melodio*  
*Magnolia*

Ve, sola, sola, sola!  
Mi iras sola,  
mi sidas sola,  
mi kantas sola,  
mi drinkas sola,  
mi kuŝas sola.  
Vole ne vole jen izola  
mi staras longe tie  
jen kun ĉagreno senkonsola.  
Malvarmo eta sur min falas  
neatendite fola.

Nu, kiu vidas, ke ŝminkaĵo mia  
ja forlavitias de la larm' petola?  
Mi atakitas de malsano kaj malvarmo  
en raŭndoj de turment' laŭvola.  
Ripetadfoje mi fortondas la lampmeĉon,  
ankoraŭ mi neniel povas dormi sendolora.

## Ĝisado al printempo

—laŭ melodio *Papilio super floroj*  
Ekster domo plorsalikoj svingas  
vergojn kvazaŭ por reteni pene  
la foriron de l' printempo.  
Jen ĝi haltas, sed foriras senkatene.  
Flokoj de salikoj flirtas laŭ venfluo,  
ŝajne kun printemp' sintrene  
por rigardi kien ĝi reiros  
por fiksloĝi ja senĝene.

Kukuado de kukoloj jen aŭdiĝas  
sur la mont' kun verdkolora la mantelo.

Senkompataj birdoj ŝajne konas  
la ĉagrenojn sur la homa tero.  
Kun vintas' enmane senparola  
mi forsendas la printempon al ĉielo.  
Nun leĝere falas jen susure  
pluv' subtila ĉe vespero.

*Elĉinigis*



## Vejdo (Ĉinio)

## Huang Tingjian (1045 – 1105)

*Pejzaĝo vidita de sur la Suda Turo en*  
*E'zhou*

De l' turo, ĉe la balustrado, mi rigardas:  
River' kaj montoj nebuliĝas unumase;  
La trajoj kaj lotusoj la aromon gardas,  
Kiu traŝvebas eĉ dek liojn ĉi-okaze.  
Liberas freŝa brizo kaj brilanta lun'  
Kune alportas, de la sudo, friskon nun.

## Bubalpaŝtanta knabo

Trans la vojeto interkampa sonas lia fluto,  
kaj la vilaĝon li nun preterrajdas sur bubalo.  
Kiom da homoj el ĉefurbo, ruzaj kaj avidaj  
je fam' kaj mono, ne egalas al li en realo!



## Qin Guan (1049-1100)

## Ĝuo de frisko

Sudborde fluas malvarmeto sub salikoj  
kaj bele ornamita pont' sin lokas.  
Por ĝui l' friskon mi aliras lambastone



kaj tie sur brakseĝo min apogas.  
 Dum supre ekaperas la helbrila luno,  
 surlage en boato oni flutas.  
 Kiam zefiro ĉesis, la lotusaj floroj  
 aromon puran kaj subtilan sputas.

Zhang Lei (1054 – 1114)

## En someraj tagoj

La tagoj someraj serenas en vilaĝ' rivera,  
 La etaj hirundoj elkreskas subtegmentorande.  
 Buntaj papilioj dancadas inter floraj branĉoj,  
 La araneaj' domangula flagras brilante.  
 Kurteno invitas la ombron de luno eniri;  
 Aŭskultas mi l' bruon de fluo lite flankkuŝante.  
 Neĝblankas la haroj tempiaj, longe griziĝintaj,  
 —Simple deziras mi vivon ermitan konstante.

*Elĉinigis*



**Minosun (Ĉinio)**


Dai Shulun (ĉ.732-ĉ.789)

## Herboj distaj

Herboj distaj, herboj distaj  
 Velkis tute kaj soldatoj oldas tristaj.  
 Sude norde monton kovras neĝo bela,  
 Tra milopaj mejloj brilas luno hela.  
 Hela luno, hela luno,  
 Sono fluta splene ŝvebas ĝis la nuno.

*Elĉinigis*

**Yi Qiao (ĉino en Germanio)**



# Zhuangzi

**ĈAPITRO DUDEK-OKA**

## La reĝoj, kiuj abdikas la tronon

§28-11

La princo Mu, filo de la suvereno de la regno Wei, diris al Zhanzi:

“Kvankam mia korpo estas ĉi tie en la izoliteco de la naturo, proksime de la riveroj kaj de la maro, tamen mia koro ĉiam restas en la palaco de Wei. Kion do mi faru?”

“Amu vian vivon,” respondis Zhanzi. “Tio nature kondukos vin al la neglekto de viaj materialaj interesoj.”

“Mi tion bone scias, sed mi ne povas min venki,” diris la princo Mu.

“Se vi ne povas vin venki,” diris Zhanzi, “lasu drivi viajn pensojn, kaj ĉio iros bone. Ĉar tiu, kiu ne povas sin venki kaj tamen faras al si devigon, alportos al si duoblan damaĝon. Tia damaĝo certe mallongigos vian vivdaŭron.”

Mu estis princo de la potenca regno Wei. Estis multe pli malfacile por li, ol por simpluloj, retiriĝi el la vulgara mondo kaj vivi ermitan vivon en kaverno. Kvankam li ne atingis la Taŭon, tamen oni povas diri, ke li jam estis nutrata de iaj ideoj de ĝi.

§28-12

Kiam Konfuceo estis sieĝita en la loko ĉe la limo inter la regno Chen kaj la regno Cai, li ne povis fari kuiradon de nutraĵo dum sep tagoj. Li vivtenis sin nur per manĝeblaj sovaĝaj herboj. Pala kaj laca, li senĉese ludis liuton kaj kantis en la ĉambro. Ekstere, Yan Hui ŝirkolektis manĝeblajn herbojn, dume Zilu kaj Zigong plende parolis inter si:

“Dufoje nia majstro estis forpelita el la regno Lu; li estis malpermesita eniri en la

regnon Wei; li estis ofendita en la regno Song, kaj la arbo, sub kiu li prelegis, estis hakfaligita; li havis nenian elirejon en la regnoj Song kaj Zhou; kaj nun li estas sieĝita inter la regnoj Chen kaj Cai. Plie, tiuj, kiuj provis murdi nian majstron, ricevis nenian decan punon, kaj ĉiaj ofendoj neniel estas malpermesitaj. Sed nia majstro ankoraŭ senĉese kantas kaj ludas la liuton. Kiu alia noblulo povus toleri la hontigon ĝis tia grado?”

Trovante nenian vortojn por respondi, Yan Hui raportis tiujn parolojn al Konfuceo, kiu, ŝovinte flanken sian liuton, suspiris kaj diris:

“Kiel etspiritaj estas Zilu kaj Zigong. Voku ilin ĉi tien, ke mi ilin alparolu.”

Post kiam ili eniris, Zilu diris:

“Enfalinte en tian situacion, ni havas nenian eliron!”

“Kia sensencaĵo!” diris Konfuceo. “La saĝulo, kiu komprenas la Taŭon, vidas ĉiun vojon malfermita al li, dum tiu, kiu ne komprenas la Taŭon, vidas nenian vojon antaŭ si. Ĉar mi firme tenas min je la humaneco kaj la justeco, mi suferas malfeliĉojn en tiu ĉi senorda kaj maljusta mondo. Tio neniel devas esti konsiderata kiel situacio sen eliro. Ekzamenante mian konsciencon mi ne vidas min mizera koncerne la Taŭon. Antaŭ la malfeliĉo kaj la danĝero mi neniam perdas mia virton. Kiam la malvarma vintro venas kaj falas la neĝo kaj la prujno, mi volas profiti de tiu ĉi okazo por vidi la ankoraŭ verdan lukson de la pinoj kaj cipresoj. Ĉe tiu ĉi lumo, ĉu mia sieĝiĝo inter la regnoj Chen kaj Cai, ne prezentas raran ŝancon por mi?”

Ĉe tiuj ĉi vortoj Konfuceo reprenis sian liuton kaj rekomencis trankvile sian kantadon. Tiam Zilu, sentante sin inspirita kaj ekscitita, prenis sian ŝildon kaj ekdancis kiel bravulo. Zigong diris:

“Mi hontas, ke mi ne sciis, kiel alta estas la ĉielo kaj kiel profunda estas la tero!”

En la antikveco la homoj, kiuj atingis la

Taŭon, trovis ĝojon kaj plezuron kiel en la favoraj situacioj, tiel ankaŭ en la malfavoraj. Ilia plezuro ne venis el la videblaj avantaĝoj aŭ malavantaĝoj. Kun la Taŭo kaj la virto enprofundiĝintaj en la menso, ili kredis, ke la malavantaĝoj povos turniĝi en avantaĝojn, kaj inverse, same kiel la somero cedos la lokon al la vintro kaj la pluvo sekvas la venton. Jen kial Xu You trovis plezuron en la izoliteco sur la norda bordo de la rivero Yingshui kaj Gong Bo vivis senzorgan vivon sur la monto Qiushou.

### §28-13

Kiam la reĝo Shun proponis sian tronon al sia amiko Beiren Wuze, tiu ĉi diris:

“Kiel stranga vi estas, ho suvereno! Vi ja devus daŭrigi vian terkulturadon sur la kampoj anstataŭ vizitadi la kortegon de la reĝo Yao kaj akcepti ties proponon pri la trono. Kaj plie, vi eĉ volas alporti la saman malhonoron sur min. Mi hontas vidi vin!”

Tion dirinte, li dronigis sin en profunda lageto nomata Klara kaj Malvarma.

### Elĉinigris



**Wang Chongfang**

(Ĉinio)

## Ĉineske

### Yi Qiao (Ĉino en Germano)



— laŭ ĉinesko *Flirta kanto*\*

Amo, amo  
ardas kiel flamo.  
Kisi iĝas deve,  
daŭras plu eĉ reve.  
Vere, vere  
dolĉas kis' tenere.

## Feino

— laŭ ĉinesko *flirta kanto*\*

Kara, kara  
feino elstara!  
Ĉarmas via voko,  
eĉ moliĝus roko.  
Koro, koro  
mia iĝus floro.



\**Flirta kanto* (ĉine: *Tiaoxiaoling*): ĉina fiksfirma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

## Sopiro

— laŭ ĉinesko *Budhista dancisto*\*

Lunlumo feble brilas,  
lagakvo jen trankvilas.  
Via vizaĝo  
en la miraĝo.

Ĝemas zefiro,  
plenas sopiro.  
Ni ĝojus deve,  
kuniĝus reve.

\**Budhista dancisto* (ĉine: *Pusaman*): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

## Kuniĝo

— laŭ ĉinesko *Belulino Yu*\*

Rigore blovas vento,  
ĉagrenas sento.

Disiĝis ni plurljare,  
profundas sopiro amare.

Salikoj ĉirkaŭ lago,  
sunbrilus tago.  
Promenus ni kontente,  
kuniĝus en revo momente.

\**Belulino Yu* (ĉine: *Yumeiren*): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

## Firmamento

— laŭ ĉinesko *Mallongigita melodio magnolia*\*

Ho aŭroro,  
ruĝora kiel floro.  
Suno brilas,  
sur firmament' jubilas.

Ho zefiro,  
kun freŝa bondeziro.  
Luno helas,  
tra stelriver' fabelas.

\**Mallongigita melodio magnolia* (ĉine: *jianzi Mulanhua*): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.

## Aŭtunmezo

— laŭ ĉinesko *Dekses-silabo*\*

Vent'  
freŝas tra la firmament'  
favore  
el la orient'.

Stel'  
la plej vigla sur ĉiel'  
en nordo,  
saĝas laŭ fabel'.

Lun'  
plena meze de aŭtun'  
helegas;  
kune tostu nun!

*\*Dekses-Silabo (ĉine: shiliuziling): ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

## Testo

— laŭ ĉinesko *Kanto de akva horloĝo en nokto\**

Jen ŝvebas, freŝa vent',  
tra vasta firmament'.  
Jen helas, la stelo,  
sur la ĉielo.

Jen brilas, hela lun',  
en mezo de aŭtun'.  
Ni tostu, kun ĝojo,  
per unu fojo!

*\*Kanto de akva horloĝo en nokto (ĉine: genglouzi): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po ses versoj de 33,6;33,5; / 33,6;33,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xaa,xbb / xcc,xdd (x=senrima)*

## BENO

— laŭ ĉinesko *Feniksa harpinglo*

Fraŭla am'  
sen ornam'  
daŭras plene de deklam'.  
Jen fraŭlin'  
korinklin'.  
Kiun amas  
li kun obstin'?'  
ŝin, ŝin, ŝin!

Alta am'  
kiel flam'  
ardas en la koro jam.  
Ho fejn'  
laŭ destin'.  
Kiun benas  
ni do sen fin'?'  
vin, vin, vin!

*\*Feniksa harpinglo (ĉine: chaitoufeng): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po ok versoj de 3,3,7; 3,3, 44, 1, 1\*, 1\* silaboj, kun rimaranĝo de aaa,*

*bbxbBB kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.*

## Jadranka Miric (Serbio)

## Ĉerbumas mi

— laŭ inesko *Sopir-al-sudo\**

Ŝanĝiĝos  
mondo. La ŝanĝo  
tre tre doloras certe.  
Ekis "proksi" milito  
de USa-ano.

Milito  
la plej danĝera  
influenta malbone  
la mondon. Tre severa  
kaj tre fi-vera.

Alvenis  
pli varmaj tagoj.  
Baldaŭ ni somerumos.  
En la strata kafejoj  
bruaĉas homoj.

Senfinas  
spaco ĉiela.  
Ekis la maturantaj  
festoj. Io tre hela.  
Zumo abela.

Plenas ĉi  
maja somera  
kun surprizoj kaj ŝtormoj.  
Falas eĉ fi-hajlero.  
Venkas sufero.

*\*Sopir-al-sudo (ĉine: yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

— ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ —  
Eldonas Redakcio de *Penseo*  
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)  
Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)  
[www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm](http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm)  
— ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ ♦ —